

<http://tretis.tone.se>

**Feroaj
insuloj,
balada
kulturo
kaj
Esperanto**

Martin Strid
2017



Feroa ŝafo

Celo

La esenco estas enkonduki
novan kulturan fenomenon en
la internacian movadon.

Baladdancoj helpis savi la
feroan lingvon kaj povas fortigi
ankaŭ esperanton.



Fraterkuloj atlantikaj

Enhavo

Feroaj Insuloj –
baladaj ĉendancoj
– utilo – historio –
baladestro –
kiel ĉendanci –
karaktero de feroaj
baladoj – kial feroan
dancon por
Esperantujo – vizio –
kiel ekhavi baladojn –
mi komencis traduki –
verki novajn baladojn
en esperanto –
baladigi poemojn –
novan verkon BDF
– ni lernu danci –
Ek!



Beinisvörð, 469 m

Feroaj Insuloj



Føroyar



Aŭtonomia regiono de Danujo
sed ne membras en Eŭropa Unio

Preskaŭ 50 000 loĝantoj
sur 18 insuloj

Ĉefurbo Tórshavn, 17 000 loĝ.

Skandinavoj ek de jaro 850
norvega regno 1035
Kalmara unio 1396
dan-norvega 1523
dana 1814

Dialekto de norvega lingvo
antikva

Ĉirkaŭ 70 000 strofoj da malnovaj
baladoj



Gásadalur



Tórshavn



Baladojn dancu feroe



Balado = rakonto kiun oni dancas


Filmo 11 (3:31)

Utilo de baladaj ĉendancoj



Festeno, ĝojo
Komuniki rakontojn
Fortigi komunecon
Bastiono de lingvo

Historio de baladaj ĉendancoj



Ĝenerala fenomeno en mezepoka Eŭropo
Certe jam en 14-a jarcento
Motivoj pli aĝaj: Kanto de Rolando
Feroe sama ritmo kiel praislandaj paganaj
poemoj (Havamal, 5-a jarc.)
Popoldanco de Feroaj Insuloj ĝis hodiaŭ



Malnovaj baladoj

ĝis hodiaŭ dancataj en Ferooj:

Baladoj* pri Sigmund, kiu kristanigis Feroajn Insulojn (10-a jarcento)

Jalgrima balado*, pri unuigo de Norvegujo ĝis Blanka Maro (10a jc)

Vilmunda balado*, pri sveda reĝo en Garda Regno, embrio de hodiaŭa Rusujo (9a jc)

Roncevala batalo, pri lukto inter frankoj kaj eŭskoj en jaro 778

Balado de Virgar*, pri eŭropa Epoko de Popolmigradoj (2a-5a jc)

kaj aliaj

* jam tradukis MS




13/35

Baladestro

Regas la baladon:
etoson, rapidon, tonalon,
vicordon de strofoj

Povas havi apud si apoganton kiu ankaŭ parkerigis



Kiel ĉendanci



Klube: Filmo 12 (3:53)

Feste: Filmo 54 (10:52)

Konferenco: Filmo 14 (2:04)

Ekskurse: Filmo 15 (1:13)


Karaktero de feroaj baladoj

Ununura muzikilo: la homo mem

Multaj strofoj – rakontas historion

La rekantaĵo estas la pli longa parto de ĉiu strofo

La nombro da paŝoj en strofo – kaj verso – ofte estas malpara, eĉ primo



Lítla Dímun = Malgranda Dujmo , 414 m

Kial ĝuste ĉi tiu danco bonas ĝuste por Esperanto?

La paŝoj estas facilaj, do lerneblaj por homoj el diversaj kulturoj.

La ĉeno sendependas je aĝo, paroj, sekso, sportemo aŭ eĉ vidkapablo! **Filmo 16 (3:27)**

Kantante oni ekzercas la lingvon.

Lerni kaj parkerigi baladan tekston estas bona helpilo por lerni kaj memori la lingvon.

Baladestro ne devas kapabli bele kanti. Sufiĉas laŭte kaj ritme paroli, tiel ke ĉiuj aŭdu la vortojn.

Oni ne bezonas ilojn.

Dum la danco oni laŭvice renkontas vidalvide la aliajn dancantojn en la ĉeno, unun post alia.

Ĉiam estas loko por plia homo en la ĉeno.

Per kelkaj baladoj ni ekkonu nian historion.

Vizio

Plej multaj espoj scias kaj ŝatas danci feroe. Ĉiu dua aŭ tria espo estas bona baladestro kaj oftas homoj kiuj majstras eĉ kvin aŭ dek baladojn. Feroumo estas la kulmino de multaj diversaj esperantoaranĝoj. Tio logas ĉiam pli da novaj anoj. Kaj altigas ilian lingvonivelon.

Filmo 17 (1:57)

Kiel ekhavi baladojn

Traduki de alia lingvo
Verki novan rakonton (heroan)
Baladigi ekzistantan poemon

La kerno de balado estas ĝia rakonto

(minimume kvin strofojn, kun
ripetado kajaŭ rekantaĵo)

Tindhólmur, 262 m

Mi komencis...



...en 2014 traduki el la feroa Sigurdan baladon, poste Drakon Longan, Brestan baladon kaj kelkajn pli.

Plu mi pensis: Kial ne verki novajn baladojn, pri herooj de la Esperantomovado?

La unua tia estas Valdemara balado.
Ĝi prezentiĝis en kongresoj en 2015.

Verki novajn baladojn en esperanto


A Viking longship with a red sail is sailing on the ocean at sunset. The ship is in the center of the frame, with a large red sail and a dark hull. The sky is filled with orange and yellow clouds, and the water is dark blue with whitecaps. The background shows a dark cliff on the left and a dark hill on the right.

Rakontu

historion de memorinda homo – heroo,
gravan okazon en nia historio,
specifan fenomenon

Dramigu per dialogoj

Ne abundu malgravaj detaloj kaj nomoj



23/35





Kiel baladigi poemojn

Trovei baladigindan poemon

Trovei aũ komponi melodion takte taũgan

Trovei aũ verki rekantaũon konvenan

100 føroysk frímerki
Czesław Slania

Emil Krause
Føroyskur dansur á Viðareiði

Fo 462

Tiom da poemoj!

Arany, Arosev, Auld, Baghy, **Berndl**, Bogoslavskij, **Botto**, Boulton, Bronštejn, Busch, Casas, Cezar, **Chalupka**, Ciklari, Ĉunkiu, **Devjatnin**, Dinwoodie, **Djurhuus**, Emba, Eroŝenko, Francis, Galor, Gazda, Goldberg, Grabowski, Hankel, **Havliček Borovský**, **Heine**, **Hernández**, Ĥoĥlov, Ĥrima, Jesenin, **Jung**, **Kalocsay**, Karinthy, Karwik, Kofman, Laŭlum, Ljubin, Mangada Rosenörn, Mattos, Melnikov, **Mickiewicz**, Miĥalski, Molle, **Nekrasov**, **Petőfi**, Piron, Poŝka, Privat, **Puŝkin**, Rossetti, **Rustaveli**, **Schrøter**, Schwartz, Schulhof, Sir', Szymborska, **Uitterdijk**, Urban, **Waringhien**, **Wilde**, Zamenhof ...

...malmultas virinoj kaj A-kontinentanoj

Nova verko *Baladojn dancu feroe*

Ĝis nun pli ol 400 baladoj kolektitaj:

de 5 ĝis pli ol 4.000 strofoj,

originalaj kaj tradukitaj,

novaj kaj antikvaj,

humuraj, tragediaj, instigaj, dramaj kaj aliaj,

ĉerpitaj el nia literaturo

<http://tretis.tone.se>

<http://tretis.tone.se>

Elektu vian propran
baladon! – Tiun kiun
vi mem plej ŝatas!

Kial feroan dancon por Esperantujo

Komuna ĝojo kaj kuneco

Lingvaj ekzerco kaj firmigo

Instruo pri nia historio

Interkoniga ĉeno

Simplaj paŝoj

Sen teĥnikaĵoj

Danco malferma por ĉiuj

Lerneje:

Filmo 36 (5:26)

Filmo 18 (3:30)





Do ni lanču!

Ni bezonas...

Dancemulojn
Baladestrojn
Kuraĝon!



Ni lernu danci...



...teni, ĉeni, en- kaj eliri, paŝi, rekanti...

Dankon!

Martin kaj amikoj de Granda Kurlo



<http://tretis.tone.se>



EK!

Hermes kaj la lignohakisto



Poemon verkis K. Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956)

Melodio de Lejva balado (Leivur Øssursson)

Rekantaĵon el feroa tradukis M. Strid (2015):

Paŝu firme
sur plank',

ŝuojn trivu
ankaŭ,

regu dio,
kie dancos
ni sen mank'.



<http://tretis.tone.se>

Filmetoj

Filmo 11 Sigmunda balado pli nova* <https://www.youtube.com/watch?v=3NMUn-92vo8> (3:31)

Filmo 12 Signhild Fiera* <https://www.youtube.com/watch?v=l47Nd0n9DsQ> (3:53)

Filmo 14 Drako Longa* <https://www.youtube.com/watch?v=abmpV57605E> (2:04)

Filmo 15 Bresta balado* <https://www.youtube.com/watch?v=FRgzYf0H1tQ> (1:13)

Filmo 16 La serpentego (sveda) <https://www.youtube.com/watch?v=fQwpAdtKZ1k> (3:27)

Filmo 17 Flóvin Bænadiktsson <https://www.youtube.com/watch?v=F5vhJXQqmKI> (1:57)

Filmo 18 Kvæðadagur Skulatrøð 2016 <https://www.youtube.com/watch?v=i1h0qCPdTq4> (3:30)

Filmo 36 Petro sinjor' kaj Elinborg* <https://www.youtube.com/watch?v=a8XeERcjb8> (5:26)

Filmo 54 Foka balado <https://www.youtube.com/watch?v=IUv43MxOrzo> (10:52)

* jam tradukita

(Suma tempo 32:23)